

Je la nomo de Dio

Pajam-e

# Sabzandiŝan

(Mesaĝo de Verdpensuloj)

Kultura sezon-revuo en E-o kaj la persa

**Respondeca direktorino :**

*Fariba N. Maĝd*

**Ĉefredaktoro :**

*M. Reza Torabi*



**Kovrile: Bildoj rialte Persepolo**

**Eldonaj aferoj :**

*Reza Haĝihasanlu*

**Eksterlanda abonantara afero:**

*Hamzeh Shafiee*

**Adresoj:**

P.O.Kesto 17765-184,

Tehran, Iran

Telefono : (0098 21) 7437138

Fakso : (009821) 7463812

TTT-ejo : [www.sabzandishan.com](http://www.sabzandishan.com)

Retpoŝto: [info@sabzandishan.com](mailto:info@sabzandishan.com)

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj ie ajn .

Bonvenas kultur-temaj kontribuajoj. Ni aperigas kaj Perse kaj E-e nur unua foje prezentitaĵojn.

**Enhavo:**

<i>Arte</i> .....	paĝo 2
<i>Historie</i> .....	paĝo 3
<i>Sinprezento de Azarhoushang</i> .....	paĝo 4
<i>Azarhoushang rakontoj</i> .....	paĝo 5
<i>Iranaj poetoj - Bijan Ĝalali-</i> .....	paĝo 6
<i>Vojaĝ-raporto</i> .....	paĝo 8-9
<i>Junula poemo</i> .....	paĝo 10
<i>Iranaj historiaĵoj</i> .....	paĝo 11-12

**Persa parto :**

**E-o kaj interciviliza dialogo.....** paĝo 30

Gholam Reza Azarhoushang skizas kaj konkludas ke E-istaro emas havi bonan rilaton kun aliaj kulturoj kaj ke e-istoj estas pacamaj. Li faris la prelegon en Tehrana urbo-domo.

**L. L. Zamenhof** .....

Reza Torabi prezentas koncizan vivhistorion de Zamenhof kaj liaj klopodoj.

**Kialo de bezoneco de Internacia lingvo..**paĝo 25

M. P. Habibpur artikolas pri la historio de neceseco de komuna internacia lingvo kaj finfine apero de E-o.

**Historio de E-o en Irano** .....

Ali Reza Dowlatshahi kiel esploristo de la historio de E-o en Irano prezentas dokumentojn pri la aperigo de E-o en Irano kaj starigas ankaŭ demandojn tiu rilate.

**Kio ni estas kaj kion ni celas?** .....

Traduko de la dua parto de samtitola libreto de UEA. Prezentante la celojn de E-movado tra la mondo. Tradukis Reza Torabi.

**Mondo de interreto** .....

Prezento de diversaj eblecoj per kiuj oni povas ĝui facilan komunikadon.

**Esperanto-instruado** .....

**Raporto pri la 3-a Azia E-Kongreso** ...paĝo 15

(f-ino)Nayereh Ebrahim Pour partoprenis en la 3-a Azia Esperanto-Kongreso kiel la delegitino de Irana Esperanto-Centro. Ŝi raportas pri sia vojaĝo kaj sperto.

**E-o novaĵoj** .....

Novajaĵoj pri/rilate E-o en Irano

# Faĝr Film-Festivalo

Mahsan Seifodin kaj Keyhan Sayadpour

De antaŭ 20 jaroj, ĉiu jare dum la festoj de la venko de irana revolucio (inter la 30-a de januaro ĝis la 10-a de februaro, Faĝr tagdeko) organiziĝas la plej elstara irana kinfestivalo, Faĝr Film-Festivalo (FFF). Antaŭ 20 jaroj, la unua FFF okazis en la tiam militanta Irano, etoso ne konforma al arta okazaĵo. La neniam anoncita aŭ konigita juĝistaro de la unua FFF deklaris ke neniu filmo aŭ persono meritas ricevi premion. Oni apenaŭ povis antaŭvidi dudekjariĝon de la juna festivalo, precipe pro la tiam morto de aliaj festivaloj antaŭ ties duaj aŭ triaj datrevenoj. La dua FFF tute ne similis al la unua estante malgranda kaj loka; kvazaŭ iu alia festivalo estus naskita. Sed tiu malgrandiĝo estis oportuna pro ĝia konformo al tiamaj eblecoj kaj potencoj.

FFF-oj kreskis unu post la aliaj kaj grandiĝis samtempe kun la evoluo de irana kinarto. Ekde la 4-a FFF, la festivalo internaciĝis per la aldono de tri neiranaj filmaj sekcioj. Unu el tiuj tri, "infana kaj junulara kino" fariĝis sendependa festivalo tri jarojn poste. Dum la pasintaj dudek jaroj, irana kino progresis kaj samtempe FFF fariĝis nesebarebla parto de tiu kino, ties spegulo kaj ilo por ties evoluo. Ĉiuj iranaj filmproduktantoj sendepende de la vidpunktoj deziras ke iliaj produktaĵoj sursceniĝu dum FFF pro la atento de ĉiuj kinartistoj kaj kinemuloj al tiu okazaĵo. Eĉ la nova kaj neregistara "Festo de Kino-Domo" ne sukcesis superi FFF-on. Malgraŭ la vintra klimato dum la festivalo, ĉi-jare longaj vicoj da fervoraj kinemuloj staras antaŭ kinejoj de la festivalo, speciale favore la filmoj de famaj iranaj reĝisoroj. Por la preskaŭ ĉiuj iranaj kinartistoj kaj la plejmulto de kinemuloj, FFF estas irana kino. ★



Foto:  
*"Mi, Tarane, estas dekkvinjara", gajninto de tri premioj dum 20-a FFF pro la plej bona reĝisoro, la plej bona scenaro kaj la plej bona aktorino de ĉefa rolo*

## Estimataj!

Jen la 2-a numero de nia revuo!

Aperigi revuon en lando kiel la nia similas naĝi kontraŭ fludadirekton. De longa tempo Irana esperantistaro suferis pro la manko de komunikilo kaj nun post longa procedado ni havas publikan tribunon kiu ebligas nin prezenti nian movadon al Irana socio.

Fakte ni celas du ĉefajn direktojn aperigante la revuon:

- Informadi al la perslingva mondo pri E-o, E-movado kaj E-kulturo.

- Prezenti Iranan kulturon al la E-mondo.

Nian agadon neniu subtenas kaj tute memstare kaj sendepende ni aperigas la revuon kaj tio signifas ke nia plua ekzisto forte dependos al akcepto de niaj unuopaj legantoj. Nia potenco ne estas tio kion vi konsideras!. Mi bone konscias ke ankoraŭ restas multaj mankoj sur la paĝoj de nia revuo sed ni intencas ke ĉiu numere plibonigi la enhavon de la revuo. Ĉu kvalite ĉu kvante.

Se la revuo plaĉas al vi bonvolu diskonigi ĝin al la aliaj!

Se la revuo ne plaĉas al vi bonvolu speguligi tiun al ni!

Viaj kontribuajtoj estas bonvenaj.

Daŭre je via dispono;

La redaktoro

# La 5an aŭ La 17an de decembro?

Ali Reza Dowlatshahi

Antaŭ kelkaj jaroj, mi devis paroli pri Esperanto por ne esperantistoj. Mi decidis paroli pri Historio de Esperanto. Do, mi re-travidis miajn librojn kaj mi skribis kelkajn notojn, sed dum mia serĉado, al mi kreiĝis demando.

Je miaj libroj mi trovis libreton, kiun donacis al mi, mia pola amikino - kiu bedaŭrinde ne estis/as esperantistino - kaj por unua foje mi tralegis ĝin .

Tiu du-lingva libreto (Pole kaj Esperante) nomiĝis **Kiel Kreiĝis la internacia lingvo** (1995) de s-ino Halina Baranowicz . Antaŭe mi ne legis ŝian nomon . Sur la paĝo 25 de ĉi-tiu libreto oni povis legi :

*“La 17an de decembro en la 1878 jaro, en la hejmo de Zamenhofo okazis vesperkunveno, dum kiu la multnombre kunvenita familio, geamikoj kaj kolegoj aplaudis la feliĉan kreinton de la internacia lingvo. La patro ne ĉeestis ĉi-tiun solenaĵon. La knaboj horkantis himnon de frateco verkitan de Ludoviko : “Malamikeco de la nacioj / falu, falu jam tempo estas / la tuta homaro en familion / unuigi devas”.*

Sed kiam mi legis ĉi-tiun paragrafon, apud mia mano estis la libro de Adam Zakrzewski: *“Historio de Esperanto 1887- 1912”*. Mirinde, sur la 6-a paĝo de ĉi-tiu libro oni povis legi *“La 5an de decembro 1878 en rondo de varsoviaj gimnazioj estis entuziasme festita la apero de nova lingvo, simbolo de frato unuigo de tuta homaro . Dum tiu festo longe sonis strofoj de nova himno : Mal amikete de las nacjes / kado ,*

*kado jam temp esta ! / la tot homoze in familje / konunigare so deba”*.

Tuj , mi rememoris ke en *“Historio de la lingvo Esperanto”* – Verkita de Edmond Privato- ankaŭ mi legis pri ĉi-tiun temon. sur la paĝo 27 de la libro oni povas legi la priskribon de L.L Zamenhof mem: *“la 5an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la ekvivigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis parolo jen la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon. kies komencaj vortoj estis la sekvantaj : Mal amikete de las nacjes/ kado , kado jam temp esta / la tot homoze in familje / konunigare so deba”*.

Ankaŭ mi rememoris ke D-ro Lins sur la paĝo 532 de sia libro – *La danĝero lingvo* – skribis pri tiu punkto: *1878, 17-a decembro projekto de “lingwe uniwersala” pretigita.*

Laŭ historio de nia movado, mia opinie, tiu okazo kaj la festo estas tre grava, ĉar L.L.Z. kreis la “ lingwe uniwersala” kiun mi deziras nomi *“La pra- esperanto”*. Nun, mi demandas min: La 5an aŭ la 17an de decembro? kiu estas ĝusta? Kial diferenco? Ankaŭ mi demandas: Se Zamenhof mem skribis 5an de decembro, kial s-ino Baranowicz kaj D-ro Lins skribis 17an de decembro?

Ĉu Zamenhofo skribis laŭ malnova kalendaro? Se tiu kalendaro estis Pollanda, ĉu ĝi similis kiel Ruslando? Aŭ ekzistas aliaj kialoj? ★

۳۰

3

## ABONILO

**Sabzandiŝan** (Mesaĝo de Verdpensuloj)  
Kultura sezon-revuo en E-o kaj la persa

Jes mi deziras aboni la revuon.

Nomo :                      Familia nomo :                      Naskiĝjaro :                      Profesio :

Adreso :

Dato :    Subskribo :

**Jara abonkoto** (inkluzive aerpŝta sendado) : 20 Eŭroj

**Pagmaniero** :Oni bonvolu pagi ĉe UEA al la konto : **iece-h** (Irana Esperanto-Centro) kaj sciigi la redakcion sendante la subskribitan abonilon.

# Mia biografieto

Mia nomo estas Gholamreza Azarhoushang. En iu tago, kiu estis malvarma, mi salutis al tiu ĉi mondo. Kriante kaj plorante. Eble nek mi, nek mia familio estis interesa por mia alveno. Mi naskiĝis en ĉi-tiu familio kiu estis malriĉa je ekonomie kaj riĉa je infano. Ĉiokaze, mi venis. Vole aŭ ne vole. Tiu, tute ne estis grava por la mondo aŭ eble por homaro. Tiu malvarma tago estis la 10an de marto de 1956. Ĝuste dektagoj antaŭ Irana novjaro.

Mi pasigis elementan lernejon kaj mezlernejon, ne tro malfacile. Sed kiam mi komencis altlernejon mi devige laborante pasigis mian studadon. Intertempe, studi pri historio, literaturo, filozofio kaj ekonomio estis miaj interesaj temoj. Kiam mi fariĝis 18 jaraĝa, mi skribis mian unuan novelon.

Post du jara militservado, mi sukcesis pasigi specialan ekzamenon kaj fariĝis instruisto en alta lernejo, instruante historion kaj literaturon. Samtempe mi fariĝis studento en universitato.

En 1978, okazis revolucio en Irano kaj mi tiu rilate ankaŭ estis aktiva en altlernejo kaj en socio. Sed, revolucio ne permesis al mi resti longe kiel instruisto. Oni tre ĝentile diris al mi: "iru for!" kaj mi kiel obeema homo lasis tiun profesion, kiun mi tre ŝatis.

Post okazo de "kultura revolucio", denove oni diris al mi: "Nia socio ne plu deziras homojn kiel vi, esti studento. Bonvole iru for!" kaj mi por ĉiam adiaŭis unversitatan studadon.

Mi por kelkaj jaroj, laboris kiel taksi-ŝoforo, laboristo kaj fine kiel ĝenerala direktoro de diversaj kompanioj kaj uzinoj. Intertempe, mi okupiĝis pri teatraĵo kaj kino, skribante kritik-artikolojn, scenojn por kino kaj televid-serioj. Mi ankaŭ kiel reĝisoro kaj helpanto de reĝisoro du film-seriojn por televid-elsendo reĝisoris. Tamen denove miaj skribaĵoj ne estis akceptitaj kaj finfine mi lasis tiun ĉi profesion al tiuj, kiuj povis en tiama politik-atmosfera labori kaj toleri.

En 1987 mi konatiĝis kun Esperanto. Tiam mi lernis ĝin ne serioze. Mia tre kara amiko, s-ro Reza Kheyekhah instruis ĝin al mi kaj mia edzino. Li poste, kiam estis en Japanio, sendis al mi libron pri speciala alternativa medicino, nomiĝante *Yumeiho terapio*, kiun iniciatis d-ro Saionji Masayuki. Mi legante ĝin intersiĝis pri ĝia kapableco kaj laŭ propono de s-ro Reza Kheyekhah, mia edzino tradukis ĝin al la persa lingvo kaj d-ro Masayuki invitis min iri al Japanio, en jaro 1991.



Foto: Reza Torabi

Ne longe pasis, ke mi fariĝis Yumeiho-terapiisto kaj Esperantisto. Mi vojaĝis al 27 landoj en kvin kontinentoj, kiel internacia reprezentanto de la Internacia Medicina instituto de preventa praktiko, instruante Yumeihon kaj uzante Esperanton.

Dume, mi tradukis jenajn librojn el Esperanto al la persa lingvo:

- 1- **Sindonema arbo**, de Silvester Shel Stajn
- 2- **Aventuro de reĝo stultulof**, de F.V. Durono
- 3- **Vulpoj de amikeca insulo**, de Takashi Hiroyuki
- 4- **La luksaj mortintoj**, De Oe Kenzaburo
- 5- **La knaboj de Pau'lo- starto**, de Ferenc Molna'r
- 6- **Facile legebla Akupunkturologio**, de Zhu Bin
- 7- **Dua versio de Yumeiho terapio**, de Saionji Masayuki (kiun mi mem enordigis laŭ mia sperto dum mia instruado)
- 8- **Usona horloĝo**, de Artur Miler, de angla ligvo kun mia edzino Zahra Karimi

Verkoj en Persa lingvo:

- 1- **Asraneh**, 15 kolektivaj noveloj (atendas permeson de ŝtato por eldono)
- 2- **Denove Mi salutas al la suno** (romano, kies unua volumo estas jam finita).

Mi jam estas ano de UMEA (universala Medicina de Esperanto Asocio), ano de MYS (Monda Yumeiho Societo) kaj ano de (IVA) Irana Verkista Asocio.

Estonteco montros, kiel mi vagados en la mondo kaj en la miaj ŝatataj temoj kaj en la vivo.

★

# Mallongaj Rakon-

Rakontetoj  
داستان‌های کوتاه

Gholam Reza Azarhoushang

## Bastardo

La doktoro diris: " mi gratulas vin, sinjoro! Via filino estas graveda."

La patrino batis al sia kapo: " eksteredzeca infano?!"

La patro frotadis siajn dentojn kaj portis sian filinon trenante kaj kolereme al la hejmo.

La fratoj demandis ŝin: "Kiu estas ĝia patro?"

La knabino ne respondis. Ekbatado komenciĝis. La knabino perdente premis siajn lipojn por ke neniu aŭdu ŝian krion. La familiaj viroj, kiam laciĝis, ĵetis la forte batitan korpon de la knabino en subteretaĝo kaj ŝlosis la pordon al ŝi. Poste ili iris trovi tiun knabon, kiun ili konjektis, ke li povas esti la patro de la infano.

La knabino en la mallumo, per mano tuŝis sian ventron kaj mallaŭte diris al si mem: " oh, mi jam fariĝas patrino!"

## Soleco

La virino ekkriis: " Ĉu vi aŭdas min? Mi ne povas pli toleri solecon."

La viro diris nenion.

La virino ĝemis: "Mi pensis ke havi edzon devus esti ĝoja afero."

La viro ankoraŭ estis silentinta.

La virino daŭrigis: " Jam estas dekkvin jaroj, ĉu vi pensas ke ankoraŭ ne estas sufiĉe?"

La viro, denove diris nenion.

La virino diris: " Nu, ne bezonas diri ion. Mi bone scias kion via koro deziras!"

La virino surmetis al la brusto de la viro, florbukedon, kiun ŝi kunportis kaj diris "mi denove revenos al vi, ĉar mi al kiu plu povas libere korelverŝi!"

Kiam la virino ekstaris kaj malproksimiĝis de la viro, tombejo el sia profunda silento akompanis ŝin.

## Ŝtelado

La viro tenante stangon de la buso per mano, sentis ke iu mano eniris al lia jakpoŝo. Li timante serĉis siajn jakpoŝojn. Ili estis malplenaj. Tiam, ekkriis: " Ho, ŝtelisto! Oni ŝtelis mian monujon." Li turnis al sia malantaŭo kaj rigardis al ĉiuj homoj en la buso. Mano de iu knabo estis enigita en sia poŝo kaj timante estis rigardanta al la viro.

" Montru al mi, vian manon, knabo!"

Estis kelkaj ĉifataj monbiletoj en lia mano. La viro prenis la monbiletojn de la knabo kaj forte nukbatis lin.

" Ĉu vi ne hontas? De nun?"

Knabo diris: "Sed, sinjoro ..."

La buso haltis en stacidomo. Iu pasaĝero, kaptis ĉemizkolumon de la knabo kaj ĵetis lin eksteren de la buso. "Silentu, aĉuleto! " La knabo alkuris al buso kaj diris: "Vidu sinjoro, tiu estis mia mono por aĉeti

medikamentojn" Pordo de la buso estis fermita kaj buso ekiris.

Iu pasaĝero diris al la aliaj: " Anstataŭ laboro, ili de nun komencas ŝteladon."

Kiam la viro enmetis monon en sian pantalon-poŝon, lia mano tuŝis memajn monbiletojn kiuj ankoraŭ estis en la poŝo.

## La granda savanto

Popolo kriis: " libereco!"

La savanto jam staris sur alta loko kaj vokis: " libereco al vi estu benata!"

En alia tempo. La popolo denove alvenis kaj kriis: "laboro!" La savanto skuis sian manon al la ĉeestantoj kaj promesis al ili: " Laboro por vi estu donata! "

Alifoje la popolo sin atingigis la pavilionon de la savanto, ne tolerante plu stari kaj ĝemis: " pano!"

La savanto ridetis kaj ĝojigan novaĵon diris al ili: " Beno al vi estu multaj!"

La popolo ne plu petis ion de la savanto. Sed, la granda savanto, kiu ankoraŭ entuziasme deziris fari sian profetan mision, aperis sur la kadavroj de la homoj kaj diris al siaj proksimaj amikoj: " ili estis bonaj sekvantoj, sed bedaŭrinde ne plu toleris. Mi ankoraŭ havis por ili multajn aliajn donacojn."

## Amo kaj malamo

La knabo diris: " Mi amas vin!"

La knabino respondis: " Mi ankaŭ amas vin!"

La knabo diris: " Ĉu ne estas bone ke ni geedziĝu?"

La knabino konsentis: " Kial ne! La amo estas la plej bela kaj pompa afero en la mondo. "

La viro diris: " Estas sufiĉe. Mi laciĝis pro viaj ĉiamaj grumbladoj."

La virino reagis: " Mi ankaŭ laciĝis pro viaj vagabondoj. Mi tute ne scias kien vi iras, kun kiu vi iras, kun kiu vi venas, kiam vi iras, kiam vi venas, kion vi faras, kion vi ne faras? Mi estas via edzino, ĉu vi forgesis?"

La viro respondis: " Ĉu vi pensas pro tiu granda fakto, ke vi estas mia edzino, mi dum mia tuta vivo devas kondamni min esti en tiu ĉi ekzilejo kaj ĉiutage tri foje - matene, tagmeze kaj vespere - esti deviga rigardi al via netrovebla bel-vizaĝo? "

La virino diris: " iru for! Mi malamas vin."

La viro diris: " Nu, bone. Mi alifoje volonte obeas vian ordonon kaj faras ĝuste kion vi deziras."

De tiam, la viro iris kaj malaperis. La virino trovis nenium postsignon de li.

# Bijan Ĝalali Irana poeto




Foto: Dorskovrilo de la libro "Ruzaneha"

۲۷

6

Inter nuntempaj vizaĝoj de Irana poezio, Bijan Ĝalali (1927-2000) estas unika vizaĝo. Lia poezio havas facilan lingvon, sed nefacilan signifon. Lia filozofia temo esprimiĝas en facila formo.

Bijan Ĝalali naskiĝis en Tehrano en fama familio. Li estas nevo de Sadegh Hedayat (1903-1951) - la fama Irana verkisto. Li finis sian du-gradan instruadon en Tehrano, kaj poste li iris al Francujo. Li studis dum 5 jaroj en Parizo, sed li ne finis sian studadon, do li revenis al Irano, kaj eklernis Francan literaturon ĉe Tehrana universitato. Poste li laboris en petrola ministrio. Li neniam edziĝis kaj li vivis sole kun siaj hundoj kaj katoj. Li forpasis en Tehrano, en feria tago, je la komenco de vintro. Liaj poemoj estas jam tradukitaj al Angla, Franca, Pola, Araba lingvoj kaj nun Esperante.

La verso de Bijan Ĝalali ne estas branĉo de la movo kiun Nima faris; sed havas radikon en Franca versa tradicio. Lia verso havas iun propran skandon de parolo. Eviti aranĝojn kaj literaturajn faradojn donis al lia poemaro specialan simplecon kaj senvestecon kiu impresis la version de la postaj generacioj, precipe la 7-a jardeko de la kuranta jarcento laŭ

Irana kalendaro.

Lia poezio estas senpena kaj abstina. Verso ekstreme simpla, sed plenplena da propraj angoroj de Ĝalali. Ĉiama angoro de Ĝalali estas la ĉeesto de morto. En la nuntempa(nunepoka) Persa verso, morto havas la plejan ĉeeston en la versoj de Ĝalali. Je la filozofia vidpunkto, Ĝalali estas pesimista poeto; li rigardas la mondon kaj la futuron de la homaro, precipe la estontecon de neprogresitaj landoj, pesimisme.

La poemo de Ĝalali sidas inter du ĉefaj movoj de la nuntempa Persa verso: Blanka verso gvidata de Ahmad Ŝamlu kaj la kosmomensisma verso gvidata de Jadolah Rojaji (Yadollah Royae). Sed ĝi havas fundamentan diferencon kun tiuj du movoj. kontraŭe al la atakema kaj agresema verso de Ŝamlu, la poemo de Ĝalali estas delikata, milda kaj kvieta; kaj kontraŭe Ŝamlu kiu implikitas la simplecon, Ĝalali simpligas la implikaĵon. Sed la poemoj de Ĝalali havas ankaŭ diferencon kun la kosmo-mensisma verso de Rojaji. Por Rojaji grava estas la vorto mem kaj ne la ekstera refero (ekstera implicio) de ĝi, sed la vortoj de Ĝalali enhavas vastan etendon de homa scio kaj kompreno, per kiuj Ĝalali multe pli cerbumas (pripensas) eltrovi (deĉifri) la ekziston ol la tempo.

Lia rilato kun la mondo temp-al-tempo estas primitiva kaj infana, kiu direktas lin al iu senkonatiĝo kaj donas lin nova difino de fenomenoj; difino jen multfaca jen multflanka.

Ĝalali havis grandan korinkliniĝon al bestoj kaj nutris la bestoj en sia kvartalo. La amo de Ĝalali al bestoj memorigas nin Francosko-n.

Liaj libroj estas :

**Tagoj** (1962), **Nia koro kaj la mondo** (1963), **La koloro de l'akvoj** (1971), **Suno kaj akvo**(1983), **Lum-ludo**(1990), **Ĉiu-tage** (1994), **Pri poemo** (1999).

\*Kosmo-mensismo = angle: space-mentalism

De la fino de l'mondo  
Mi iris  
Kun la nova parolo  
De la komenco de l' mondo

Mi timas  
De la fino de l'poemo  
Kiam  
Mia mano skribas  
La unuan vorton

Spegule  
Mi rigardas  
Kaj rediras  
La bildon de l'mondo  
Por mondo

Mi ne havas sekreton  
Mi nur rediras  
La sekreton de l'blankan  
paperon

Poemo  
Sen fine komencas  
Poemo  
Estas unu de miaj branĉoj

La mondo  
Je komenco ĝis fino  
Estas malgaja poemo  
La mondo estas kiel respondo  
Al demand, kiun  
Ni neniam scias

La nudan korpon de arbaro  
Kovras neĝo  
Kiel malvarma vesto

Mia respondo al mondo  
Al ĝojo, al malĝojo  
Al homoj  
Al ĉiu kaj ĉio  
Estas poemo

Lampo estas la poemo  
Por mi  
kaj per tiu  
Mi rigardas  
Mallumon

Sojlo  
Estas nia amiko  
Ĉar ĝi estas kun ni  
Je komenco  
Ĝis fino

Tagon  
mi edzinas,  
Nokton  
mi amatinas.

Poemo falas  
Kiel aerolito  
Kaj ĉiuj fenestroj de fatalo  
Kune kuntremas

Tradukis: Ali-Reza Dowlatshahi



Kovrilo de la libro :  
"Dar Barej-e Seer" (Pri poemo)

دوره های مدیتیشن حقیقت

خودشناسی از راه عشق

خوشبختی و آرامش را با

سکوت در درون خود

بیابید

خاتم حجازی

تلفن ۶۷۱۶۵۲۵ ۶۷۱۷۳۹۶

## زبان اسپرانتو را با مکاتبه بیاموزید!

برای کسب اطلاعات بیشتر و دریافت بروشور رایگان درباره زبان اسپرانتو و دوره های آموزش مکاتبه ای آن با ما تماس بگیرید:

سبزاندیشان (شماره ثبت ۹۰۸۵)

کانون پژوهش و کاربرد زبان بین المللی اسپرانتو


تهران، صندوق پستی: ۱۸۴ - ۱۷۷۶۵

فکس: ۷۴۳۷۱۳۸

info@sabzandishan.com

# Irano laŭ germana sperto

Manfred Westermayer - Germanio



۲۵

8

Flugo al Tehrano pere de Iran Air super la kanaloj kaj Amu-Darja kaj Turkmenbaŝi-kanalo (kiu deprenas la akvon de Aral) montris la kanal-sistemon. La kanaloj finiĝas en lagoj en la dezerto; ŝajne tiuj lagoj ne havas verdaĵojn ĉirkaŭ si; do, la akvo simple vaporigigas kaj eniras en la grundon. Post mallonga halto en Aŝgabad, la flugo daŭriĝis laŭ la vasta montaro Elburz (Alborz), inter du montar-ĉenoj, kie ŝajne ne ekzistas verdaĵo. La flugo super Tehrano montris la grandan amplekson de tiu ĉi 10 (aŭ eble 12) miliona urbo. Kiam mi planis la vojaĝon mi serĉis eblecon veturi per trajno (Aŝgabad, Maŝhad). Bedaŭrinde tio ne eblis, kaj busoj nur veturis al la landlimo, do, mi esperas, ke la internacia trajno-trafiko estos plibonigata.

En flughaveno la kontrolistino serĉis porno-broŝurojn, sed ne interesiĝis pri miaj multaj tekstoj ... . Ĉio okazis en agrabla atmosfero. Feliĉe jam atendis min Sadegh kaj alia studento, kiuj portis min al esperantista familio de Gholamreza kaj Azar en Tehrano;

Ilia filo tuj interesiĝis pri la situacio en Germanio, oni scias pri malbonaj aferoj, ekz-e ke domoj kie loĝas azilpetantoj estis bruligitaj (kaj kelkaj mortis tiam), kaj pri ksenofobio. Bedaŭrinde oni scias kutime la plej malbonajn aferojn - kaj malmulte pri la normala vivo, ke ekz-e multaj azilpetantoj preferas Germanion pro relative bona situacio. Multaj germanoj helpas al la azil-petantoj. Kiam la ekonomia situacio malpliboniĝas, multaj homoj (ek)timas. En la germana socio nun daŭras plia disfalo de riĉuloj kaj malriĉuloj; tio estas la fono por tiuj fiaj agadoj. Necesas saĝa politiko.

Mi havis la elekton dum la semajnfino kunveturi al la Kaspia Maro aŭ al Borujerd, kie ankaŭ estas vigla Esperanto grupo. Do, Sadegh kun kolego veturigis min al Borujerd, laŭ la vojo oni vidas la novan, gigantan maŭzoleon por Imam Khomeini, la ekkonstruadon de nova aeroporto 50 km for de Tehrano (espereble ili instalos bonan publikan trafikon), grandan salo-blankan ebenon kaj la urbon Ghom, kie estas centro de la persa Islamo. Borujerd estas urbo kie multaj biciklas, ĝi situas inter ne-verdaj montoj. En la valo estas verdaĵo, kaj vendrede la familioj faris piknikon - lavado de aŭtomobilo en rivereto ankoraŭ eblas tie (mi esperas ke iam ili ekscios, ke tio estas malbona por la estaĵoj en la rivereto). Kampanoj falĉis herbejon. Vespere ni sidis en eksterurba vilao kaj miaj viraj amikoj (bedaŭrinde ĉi tie ne eblis kun ge-amikoj) regalis min per tradicia manĝaĵo (tipa pano, ktp.) kaj dungitaj muzikistoj de la radio-stacio muzikis kaj kantis por la germana gasto melodiojn de la araba, irana kaj kurda etnoj - kaj ili klarigis la diferencojn. Kompreneble ni ankaŭ diskutis pri la vivo en Germanio.

Dank al Masud mi ege bone loĝis en hotelo de teksaĵkompanio. Mi eĉ ricevis gvidon tra



la bonekipita kaj- organizita fabriko kaj vidis naĝejon, sportejon, vendejon kaj preĝejon por la laboristoj. La firmao situas preskaŭ en flor-ĝardeno kaj eĉ havas propran puriginstalaĵon por la uzitaj akvo.

En la seminariejo de literaturo de profesoro Pakravan ni plurfoje renkontiĝis: por paroli la anglan lingvon kun du lernantoj, por intervjuo de regiona radio-stacio, por paroli pri Esperanto-grupoj en Irano kaj en Germanio. Kaj mi havis eblecon paroli kun la tre afabla s-ino Pakravan, ŝi estas akuŝistino kaj diris, ke akcepto de uzo de ĉador estas unue privata religia afero kaj nur nun ankaŭ ŝtate devigata. En Borujerd estas pluraj lernantoj de Esperanto ekde junaĝo.

Mi vizitis plurajn moskeojn kaj rajtis supreniri sur unu turo. Ili estas tre variaj ĉi-tie mi ne povas rakonti pri miaj impresoj.

Ni reveturis per buso al Tehran dum 4-5 horoj; en tiaj busoj ne estas divido inter viroj kaj virinoj; sed en en-urbaj busoj viroj devas sidi antaŭe kaj estas divido-strange. En Tehrano ni vizitis i.a. palacon de la antaŭlasta Ŝaho. Ĝi estas unu el pluraj, mi ne miris ke iĝis la revolucio; siatempe mi favoris tion kontraŭ-feŭdalan revolucion; nun mi esperas, ke ĝi gvidu al respekto de la homaj rajtoj, kiel ekz-e vera libereco je elekto de religio kaj je esprimado de sia opinio.

Surstrata teatraĵo montris fragmetojn el la Ŝah-name de Ferdousi (poeto, antaŭ plurcent jaroj). Ekspozicio pri la atakoj de Irako montris la damaĝojn; laŭdire Irako montris ke kemio-armilo povis mortigi tutan vilaĝon (de Kurdoj). Tiu ĉi gento bedaŭrinde nenie havas hejmlandon. Krome ni vizitis pentrolernejon kaj arto-galerion; tri virinoj lernis pentri - unu el ili pentris malpli realeca kaj tiu ĉi bildo plej plaĉis al mi; krome mi vidis bildon kio montris Jesuon. Tamen ne necesis miri, ĉar Jesuo estas unu el la profetoj.

Trafiko en Tehrano estas terura - ili devus finkonstrui la metroon - aŭ trovi alian eblecon. Eble pli facile estas konstrui super-teran veturilon por publika transporto kiel en Wuppertal (t.n. Schwebbahn, pendanta trajno).Necesas plurfoje ŝanĝi inter buso kaj taksio. Pro tio ne eblis viziti la naturhistorian muzeon; bedaŭrinde la muzeo

sub la Azadi-Turo ankaŭ estis fermita. La bazaro preskaŭ memorigis min al la rakontoj el 1000+1 noktoj.

Mi eĉ rajtis viziti prelegon de esperantistino en la ekonomia fakto de la Tehrana universitato; kaj poste la ĉeestantaj docentoj kaj profesoroj diskutis kun mi pri diferenco inter islama kaj okcidenta lando (sekureco, libereco, ekonomio kaj ekologio). Mi spertis, ke (eble dank' al la nova prezidento?) la homoj ne timas diskuti eĉ tiklajn temojn. Irano estas vizitinda lando, havas tre longan historion kaj diversajn klimatojn. Por virinoj nun ĉador certe ĝenas, sed alimaniere mi vidis, ke virinoj tute libere kaj eĉ nokte estas surstrate kaj ne timas atakojn de "sovaĝaj" viroj. Kaj mi ne havis iujn problemojn - nur devis respondeci pri kelkaj fi-germanoj. Mi deziras reformojn al pli demokrata kaj libereca politiko, sen perdo de orientiĝo, kio estas problemo en okcidentaj landoj. Mi jam spertis, ke tutmondiĝo ne estas haltigebla - dum vendereda atendado en mia hotelo en Borujerd mi spektis filmon en televido kiu laŭ mi devus esti cenzurita/malpermesata: temis pri truk-filmo, vetveturado de fantaziaj aŭtomobiloj kun ŝoforoj kiuj aspektis kiel robotoj kaj kiuj ŝatis fi-agi unu kontraŭ la alia.

Mi reflugis denove pere de Iran Air al Frankfurt kaj denove parte ĝuis la mondon el la ĉielo; tamen mi preferus veturi trajne.

★

## Sabzandiŝan

Akceptas viajn anoncojn kaj reklamojn

سبز اندیشان

آگهی می پذیرد

فکس: ۷۴۶۳۸۱۲

تلفن: ۷۴۳۷۱۳۸

info@sabzandishan.com

Nasim Ĥejrĥah Vatan

## Ĝojon mi skribos Mensogon mi skribos

Mi koncias , plu neniŭ aŭskultas al miaj rakontoj.  
Plu ĉiuj estas forpelitaj de lineoj plen ĉagrenaj.

Ek de nun, ĝojon mi skribos,  
Pri la revaj feliĉoj ne superantaj la romanojn  
Pri la ridoj frostitaj sur la lipoj plu ne ekzistantaj  
Sub la belaj tegmentoj, lulas la luliloj de bonfartaj kaj feliĉaj infanoj per nutristinoj afablaj.

Mi skribos, sur la tero, plu neniŭ naskiĝos kun piedoj kriplaj kaj okuloj strebaj.

Ĉiuj korboj plenas de fruktoj

Manĝotukoj plenas de panoj

Malplenas ĉiuj malliberejoj kaj la povreco estas koncepto abstrakta kaj malpreciza.  
La lulkanton de l' pluvo murmuris ĉiuj fenestroj en supozaj sekecoj.

Mi scias,

Oni devas ŝanĝigi

Kaj nun ĵus estas la momento, en kiu la kristo disdonas la justecon en bovloj puraj  
inter homoj senbezonaĵoj.

Plu neniŭ okulo malsekiĝos de l' ploro

Kaj malriĉfraŭlinojn de l'universo atendas reĝfilaj nupt-ĉambroj.

Plu neniŭ mano dekjara fendetiĝos de malvarmo kaj laboro neeltenebla

La tuta tero plenplenas de stringoj viola kaj blanka

Mi skribas, ke panoj estas pli dolĉaj ol mielo

Kaj la koroj pli klara ol okul-akvo

Plu birdoj en neniŭ kaĝo sopiras pri la ĉielo kaj libereco

Kaj neniŭ homo adoras krom la Dio.

Ke la mondo estas dronita en lumo, ĝojo, aklamado kaj birdoj liberaj.

Jes, mi skribos

Kaj poste mi

Anstataŭ ĉiuj malgajaj rakontoj de la mondo ploros.

Desegnajo : Sahram Hasanzade

Esperantigis: M. Fahmi

# PERSEPOLO

Iranologio  
ایران شناسی

La plej pompa kaj impona aro da historiaj palacoj de Irano kaj la

Raana Abedian

**N**i klopodas prezenti la arkitekturaĵojn kaj vidindaĵojn de Irano. Pro la graveco kaj alta valoro de historiaj postrestaĵoj de Fars-provinco, ni decidis prezenti ilin en ĉi tiu numero koncize. Kvankam ĉio el ili bezonas centojn da paĝoj de priskribo kaj ankaŭ multaj libroj estas verkitaj pri ili. En ĉi-tiu numero ni resume priskribas ilin.

## Takhte Jamshid

Takhte Jamshid estas la loka nomo de ĉefurbo de Daryoush, la granda kiun la grekoj nomis "Persepolo" kies postrestaĵoj estas unu el la pompaj restaĵoj de Irano kaj monda historio. Tiu ĉi konstruaĵo establiĝis laŭ la ordono de Daryoush, la unua reĝo de Hakhamaneŝaj reĝoj en 518 a. k. Ĝi konstruiĝis dum cent dudek jaroj por krei ĉefurbon en ebenaĵo de Marvdasht sur deklivaĵo de la sankta monto de Rahmat (monto de Mehr).

La kolektaĵo estas konstruita tute el ŝtono sur vasteco de 135000 kvadrata metro. La konstruistoj ne uzis murteron inter la ŝtonoj, nur en kelkaj lokoj ligis ilin per feraj ligiloj. La aro de Persepolo konsistas el sep palacoj, salono, pentraĵoj bareliefaj, ŝtuparoj, kolonoj kaj du maŭzoleoj.

## La palaco de Apadana

Apadana aŭ la palaco de Daryoush estas la plej grava palaco laŭ vasteco, alteco kaj lerteco de l'arkitektoj. Apadana havas 72 kolonojn je alto de 20 metroj kaj ankaŭ du grandajn ŝtuparojn en norda kaj orienta flanko. La ŝtonĉizaĵoj de ties verandoj estas unu el la valoraj kaj unikaj ĉefverkoj de Hakhamanesh-a erao. Direndas ke la vintra ĉefurbo de Daryoush en Shoush ankaŭ nomiĝas Apadana.

## La centra palaco

En sudoriento de Apadana ekzistas alia kvadrata palaco. Ĉar ĝi situas meze de aliaj palacoj, oni nomas ĝin la centra palaco. Ĝi ankaŭ renomas je "tri-pordega kastelo".

## La palaco de Hadish

La palaco de Hadish estas unu el la privataj palacoj de Khashayarsha kaj situas sur alta roko sude de Persepolo.

## La palaco de Tachar

La privata palaco de Daryoush kiu estas en la sudo de Apadana kaj pro la poluriteco de ĝiaj ŝtonoj renomas je "Salono de la spegulo".

## Cent kolona salono

Cent kolona salono estis la plej granda akcepteja palaco de Khashayarsha kaj ties vasteco estis 4900 kvadrata metro kaj ĝi formoĝis el cent ŝtonaj kolonoj. Ĉi-tiu salono havis 8 antaŭ pordo(aŭ porĉo) enir-elira. En Persepolo ekzistas en tute pli ol 3000 bareliefaj kiuj eksterordinare havas harmonion unu kun la alia. La kolonoj de Persepolo estas el la gravaj elementoj de arkitekturo de Hakhamanesh-a erao.

## La pordego de Khashayarsha

Post paso el eniraj ŝtuparoj ni renkontiĝas salomon 612.5 kvadrat-metra en kies okcidenta antaŭpordo ekzistas la statuoj de du kolosaj flugilhavaj bovoj kiel gardistoj kaj vidiĝas du fabelaj bestoj nomataj *Abolhowl* kiujn formas la kapo de homo, flugilo de aglo, kaj torso de bovo en orienta antaŭpordo. En supra parto de Persepolo en deklivaĵo de Rahmat-monto ekzistas du maŭzoleoj kiuj estas la tombejoj de Ardeshir, la dua, kaj Ardeshir, la tria.

Persepolo dum ĉirkaŭ ducent jaroj estis la loĝloko de la reĝoj, kaj en la jaro 330 a. k. Aleksandro Makedonia ĝin bruligis por pereigi la esperon de la persoj por restariĝo de sia ŝtato kaj de post tiam Persepolo estis forlasita.

## Pasargad

La ebenaĵo de pasargad situas norde de Persepolo en la distanco de sepdek kilometroj sur kampo de Morghab. Tie ekzistas la postrestaĵoj de la unua ĉefurbo de Hakhamanesh-a kiun oni vere povas nomi la lulilon de dokumentita historio Irana. Pasargad deriviĝas el la nomo de unu el la persaj gentoj kaj signifas parto bivakejo. Pasargad kontraŭe al Persepolo ne estas sur unu kampo sed ĝin konsistigas kelkaj disaj palacoj en vasta ebenaĵo. Kvankam en postaj tempoj translokiĝis la ĉefurbo el Pasargad al Persepolo, sed la kronada ceremonio havis precipan lokon en Pasargad. Kourosh-la granda- ne nur formis la plej grandan kaj fortan imperion de persgentaj nomadoj sed ankaŭ li bazis novan kaj imponan manieron en arto kaj arkitekturo mal-longtempe ne kredebla kiu poste en Persepolo famiĝis je stilo de Hakhamanesh-a.

La palacoj de Pasargad, ĉiuj situis inter ple-nakvaj kaj verdaj ĝardenoj. La plej gravaj remalkovritaj postrestaĵoj de pasargad estas:

### La maŭzoleo de Kourosh

La nomo de Pasargad ĉiam estas sinonima kun la maŭzoleo de Kourosh. Ĉi tiu simpla konstruaĵo estas la debuta konstruaĵo kaj konsistas el blanka ŝton-mansarda plafono (Shirvani) kiu staras sur kelkŝtupa piramido kaj havas nur unu eniran pordon. Ĉi tiu tombejo kvankam simpla sed demonstras la forton kaj aŭtoritaton de ĉefo de Hakhamanesh-a dinastio.

### La enira palaco

Je distanco de milmetra nord-oriente de maŭzoleo de Kourosh estas restaĵoj de konstruaĵo pri kiu oni supozas estui la enira palaco. La salono de palaco havis ok ŝtonajn kolonojn kun glataj kaj poluritaj surfacoj. Tuta planko de la palaco estas pavimita du-tavole per ŝtono. Ĉirkaŭ 150 metra okcidente de la enira palaco oni malkovris la restaĵojn de ponto sur rivero. Sur du flankoj de la ponto estas konstruita du ŝtonaj muroj kaj en la fundo del'rivero ekzistis 9 ŝtonaj kolonoj.

Verŝajne ĉi tiu ponto estis la vojo inter la enira palaco kaj la akcepteja palaco.

### La akcepteja palaco

Cent metroj maldekstre de la ponto ekzistis palaco kun altaj kolonoj kiu estis konstruita speciale por akceptad-ceremonio de la reprezentantoj kaj gravuloj alilandaj kiuj venis por viziti Kourosh la grandan.

### La centra salonego

La centra salonego havis ok kolonojn de kiuj post 25 jarcentoj, nur unu surprizige ankoraŭ restas. Kvar pordo malfermiĝis el balkonoj al centra salonego kiu estis ornamita per reliefaj pentraĵoj.

### Privata palaco de Kourosh

Ĝi situas ĉirkaŭ tricent metra for de akcepteja palaco. Ĝia plano estis H-forma kaj ĝia salonego estis surstarigita sur 30 kolonoj. La orienta balkono de salonego ankaŭ konsistas el kvardek kolonojn. Sur la muro de unu el balkonoj Ekzistas epigrafo kun kojnoforma teksto tri lingve kiu legiĝas jene: “*Mi estas Kourosh, la Hakhamanesh-a reĝo*”. Ĝia okcidenta balkono havas 24 kolonojn. La muroj kaj balkono havis multe da reliefoj kiuj jam ruiniĝis. Supoze ke ĝi estus la privata palaco de Kourosh, la granda.

El aliaj postrestaĵoj en Pasargad ni povas citi la malliberejon de Salomono citadelon, kaj adorejon.

### Naghshe Rostam

Shiraz havas la plej valorajn praaĵn heredaĵojn kiuj konsistas el postrestaĵoj de eraoj de Hakhamanesh kaj Sasanian, kaj eĉ pli la postaj. Inter ili ruiniĝis parto pro la naturaj difektoj, kaj parto pro la homaj ruinigaj intervenoj. Nur iom el ili restis imuna. Unu el ili nomiĝas “*Naghshe Rostam*”

